Johann Wolfgang von Goethe,

# Egalaĵo (Noktokanto de migranto)

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Super ĉio iĝas
Kviet',
Kaj ne moviĝas
Pro ventet'
Iu foli';
Silentas la birdoj ĉirkaŭe.
Atendu – baldaŭe
Ripozos vi.

*Traduko de la Germana poemo "Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)" de* Johann Wolfgang von Goethe *(∗1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1983-01.*

*MR-03-4 / Arg-356-707 (2006-03-20 14:44:12)*

Johann Wolfgang von Goethe,

# Same tiel

*tradukita de Richard Schulz*

Super ĉiuj montoj
Trankvil',
Kaj ĉiuj fontoj
Sen babil';
Aŭdas vi ne
Birdetan ĉirpon arbare.
Pensu prepare
Pri la pere'!

*Traduko de la Germana poemo "Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)" de* Johann Wolfgang von Goethe *(∗1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de* Richard Schulz *(Rikardo Ŝulco, ∗1906-07-12 – †1997-09-26).*

*Arg-356-706 (2013-02-26 15:16:30)*

*Tiu Esperantigo aperis komence de la okdekaj jaroj de la 20a jarcento en la "Vestfaliaj Flugfolioj", kiujn eldonis Rikardo Ŝulco (Richard Schulz), honora membro de Germana Esperanto-Asocio. Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon* `http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz`*.*
*Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon* `http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz`*.*

Johann Wolfgang von Goethe,

# Same

*tradukita de Pejno Simono*

Super montopintoj —
silent',
tra pinopingloj
la senvent'
spiras sen fort';
arbare la birdoj ekmutas.
Pretu, aludas
silento pri mort'.

*Traduko de la Germana poemo "Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)" de* Johann Wolfgang von Goethe *(∗1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de* Pejno Simono *(Simon Edward Adrian Payne, ∗1941-12-23).*

*Arg-356-1974 (2014-03-14 14:12:56)*

*Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en* `http://eo.wikipedia.org/wiki/Goethe`*.*